

Eŭropa Bulteno

Septembro 2014, Numero 141

DU EŬROPGRAVAJ POLITIKISTOJ TRAKTIS MULTLINGVISMON EN KRYNICA



Jam la naŭan jaron Eŭropa Esperanto-Unio sukcesas partopreni en la Ekonomia Forumo de Centra Eŭropo, okazanta en pola urbo Krynica. Ĉijare ĝi okazis inter la 2a kaj 4a de septembro. Eŭropa Esperanto-Unio partoprenis denove per bunte aranĝita stando, kiu de jaro al jaro rajtis okupi pli kaj pli da loko, kaj plie per paneldiskuta programero pri la eŭropa lingva situacio. Pensante, ke al la forumo venas miloj da partoprenantoj, la esperantista agado en la Forumo havas grandan konigan valoron inter ŝlosilaj homoj. Unuafoje aktive partoprenis Universala Esperanto-Asocio pere de nepola reprezentanto. La partopreno estas ebla dank al la delonga iniciato de EEU, kune kun la senlaca loka agantino Halina Komar kaj la oragnizanto de EEU Petro Baláž (SK). Necesas ankaŭ substreki la rolon de la prizorgantoj de la budo Dorota Rodzianko (PL) kaj Matthieu Desplantes (FR), ambaŭ dungitoj de E@I en Slovakio, sur foto starantaj malantaŭ pola senatano Wittbrodt, Halina Komar kaj Jozef

Reinvar. La partopreno de la Eŭropa Esperanto-Unio en la Forumo ricevis financon subtenon de UEA, ESF kaj la fondaĵo 'Esperanto Internacia'.

Ĉi-jare la panela diskuto rajtis okupi ne horon sed 90 minutojn. Ĝi okazis merkredon, la 3an de septembro kun la titolo „Multlingvismo en Eŭropo: ebloj por ĝia konservado”. La oficialaj lingvoj de la forumo estas la angla, pola kaj rusa, kun samtempa interpretado. La pli ol 300-paĝa programo (havebla papere kaj elektronike) dediĉis tutan paĝon (p. 197) al tiu ĉi kunsido kun la sekva resumita enkonduko: “EU oficiale subtenas multlingvismon, rekomdante, ke ĉiu civitano lernu almenaŭ tri lingvojn, inkluzive de la gepatra. Sed kio okazas en la praktiko? Tre malmultaj personoj atingas duan lingvon ĝis la nivelo C1, kaj malpli ol 1% parolas bone trian lingvon. La tuteŭropa enketado en 2012 eĉ ne enketis pri la nivelo C1, ĉar tre malmultaj studentoj atingas tiun nivelon. Ĉu propedeŭtika aliro povos bonigi la situacion?”



La panelo diskutis la praktikajn rezultojn el antaŭaj jaroj, kun ebloj rilate al la nuna eŭropa situacio. La gvidanto de la kunsido estis Seán Ó Riain, la prezidanto de EU. Komence li prezentis la panelanojn kaj oni projekciis la kantadon de la Eŭropa himno en Esperanto. Enkonduke li traktis tri temojn: la financajn, propedeŭdikajn (lernfaciligajn) kaj kulturajn argumentojn por nia lingvo. Poste parolis:

Jan Figel, vicprezidanto de la Nacia Konsilio de Slovakio

Unuavice oni povas imagi, ke lingvaj demandoj ne prioritatas en Eŭropo kun gravaj sekurecaj zorgoj por prizorgi, sed en la longa daŭro ili gravegas. Ni devas nepre protekti la multlingvecon. Se ni perdas tion, ni perdas pli ol ni povas imagi. Konsideru unue la Konsilion de Eŭropo, kiu kovras enorman teritorion, de Lisbono ĝis Vladivostoko, kaj havas 46 ŝtatojn membrojn. Granda nombro da lingvoj en tiu teritorio ne ricevas oficialan statuson en tiu Konsilio. S-ro Figel vidis la temon de multlingveco, kaj dum la prepara fazo por aliĝo de Slovakio al la Unio, kaj poste kiel reprezentanto de ties membro-ŝtato. Li servis de 2004-2009 kiel Eŭropa Komisionano kun respondecado pri Edukado, Kulturo kaj Multlingvismo; lia tasko estis iel aldoni plusvaloron al tiuterenaj streboj. La nombro da lingvoj en EU kreskis de 11 ĝis 21, poste 24, kun uzo de tri alfabetoj. La kostoj de lingvaj servoj en EU sumas je unu miliardo da eŭroj jare, ekvivalenta al unu taso da kafo por ĉiu unuopa civitano en la Unio. Iuj el la lingvoj de Eŭropo rolas kiel mondlingvoj. Gravas pripensi ankaŭ iliajn mondnivelajn rolojn.



Lingva kaj kultura diverseco estas esenca parto de la EU-familio – surbaze de la rajtoj de la civitanoj. Ĉiu havas la rajton alparoli instancojn en sia propra lingvo, leĝoj fariĝas validaj, nur kiam ili estas akireblaj en ĉiuj lingvoj de la Unio. Gravas kiel ni traktas kaj instruas lingvojn. Oni diras, ke kioma estas la kvanto da regataj lingvoj, tiomobla estas la valoro de homo – ĉar ĉiu lingvo malfermas pardonon al koncerna kulturo. Figel plu parolis pri edukado. EU povas helpi, subteni, sed la konkreta

politiko tiukampa estas formata je nacia aŭ enlandregiona niveloj. La lingvoinstruaj statistikoj ne montras bonan tendencon. Por kontraŭi tion gravas lerni samtempe lingvon kaj ĝian kulturen kuntekston.

Datenoj montras, ke la moveblo de homoj forte korelacias kun lingvokono. Sekve, ni bezonas pli bonkvalitan lingvo-instruadon. En tio la novaj membroŝtatoj povos ludi aparte fortan rolon, ĉar ili aldonas novajn lingvojn kaj identecojn. En 2016 Slovakio transprenos la prezidadon de la EU, kio donos gravajn eblojn vidigi la temon de multlingvismo. Li fine diris ke necesas novaj aliroj, novaj iniciatoj, en kiuj oni konsideru la plej diversajn eblojn, inkluzive de rolo por Esperanto; nepraĵo estas liveri sistemon, kiu kostas malpli da mono kaj donos pli bonajn rezultojn.

Edmund Wittbrodt, pola senatano kaj antaŭa edukministro de Pollando:

Ni devas pripensi la sekvojn, se ni enkondukus Esperanton al la lingva mikso en Eŭropo – ĉu tio kreskigus aŭ malkreskigus la lingvan diversecon? Povus esti, ke ĝi alportus riĉigon. Ĉe teknikaj universitatoj en Pollando 75% el la finstudintoj elektas studi lingvojn, plejparte la anglan, sed ankaŭ la germanan aŭ francan – sed ne sen problemoj. Pri la propedeŭtika valoro, konstatablas, ke kono de la Latina lingvo portas faciligon lerni aliajn lingvojn; ĝuste ĉe Papo Johano-Paŭlo la Dua, frua kono de la Latina simpligis la vojon por liaj multlingvaj kapabloj. Esperanto, estante pli facile lernebla, povus liveri similan rezulton – se jes, ĝi kontribuas al lingva riĉigo.

Senatano Wittbrodt alparolis la kunsidon pollingve (la aliaj angle). Li daŭrigis: “Kiam mi ĉeestis altlernejon, mi aŭdis pri Esperanto, kaj oni por ĝi havis altajn esperojn. Poste tamen venis la epoko de komputiloj, kie 80% de la programoj kaj interfacoj tiutempe uzis la anglan. Tamen, ni povas imagi provojn enkonduki uzadon de Esperanto kiel katalizilo al pliaj lingvoj. Ni estis inspiritaj per la centjara festado de la eldono de la Unua Libro de Esperanto, kaj mi konstatis, ke ekzistas parolantoj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Japanio, Ĉinio, Brazilo kaj aliaj Latin-Amerikaj landoj. Esperanto povus ludi rolon en la kontaktoj preter la limoj de la Eŭropa Unio.

Pri tiu Unio, ni devas konstati, ke aldono de lando implicas aldoni lingvon, kaj aldoni kostojn. Por pli etaj kunsidoj oni ŝparas kostojn uzante malpli da lingvoj.

La senatano priparolis iniciaton nuntempan ĉe la pola Ministerio pri Kulturo kaj la Nacia Heredaĵo starigi liston de ne-materiaj mondheredaĵoj kun la ideo, ke Esperanto eniru tiun liston. Se tio sukcesos, imageblas, ke la koncepto disvastiĝu al aliaj landoj de Centra Eŭropo, unuavice ĉe la Viŝegrada landkvaropo. Li daŭrigis: “Pri lingva evoluo, ni devas havi internacian aliron.

Estus tre malfacile enkonduki novan devigan lingvon en nian eduksistemon, sed malpli formalaj ebloj devas ekzisti. Por realisme esplori eblojn, ni devus scii proksimume kiom da parolantoj de Esperanto ekzistas en Pollando kaj en la mondo – tio estus nia komencpunkto. Fine, ni volas aranĝi ke la nuna ekspozicio kiu staras en la pola senatejo transiru iam al la sidejo de la Eŭropa Parlamento.

Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA:

Lia devenlando programe estis indikita kiel Novzelando. Li ripetis resume la propedeŭtikan valoron de la lingvo, sed asertis, ke ĝiaj interkulturaj valoroj devas esti egalmezure emfazataj kaj eluzataj, unue la propraj kulturaj valoroj de la lingvo evoluigitaj tra 120-jara periodo, sed egale aŭ pli grave, ĝia kapablo funkcii kostefike kiel ponto inter aliaj kulturoj. Apoge al tio, li citis multajn lerneajn interŝanĝprogramojn okazigitajn pere de Esperanto, tipe kun financa apogo de eŭropaj programoj kiel Komenio. Rilate al planoj starigi konkretan projekton en la Viŝegrada landkvaropo, li esprimis pretecon persone kaj nome de UEA helpi enplekti hungarojn en la planojn.



Jozef Reinart, Ĉefkonsilisto en la slovak Ministerio pri Eksterlandaj kaj Eŭropaj aferoj.

Li malfermis siajn komentojn per cito de statistikoj, kiuj montras, ke la lingvoakirado mezurita en 2012 diversmezure malkreskis kompare kun la analizoj el 2005. Li citis rekomendojn de la laborgrupo pri multlingvismo en kiu li partoprenis, liverita en 2011 al la Eŭropa Komisiono. Tiu pledis por pli da esploroj pri lingva pedagogio, la rolo de ekzamenado, la propedeŭtika valoro de diversaj lingvoj, malpliigo de la rolo de la angla lingvo, cele al pli justa pritakso kaj protekto de ĉiuj el la lingvoj en la Unio.

Ferme, Seán Ó Riain dankis al ĉiu interveninto, esperante, ke sekvos el la interparoloj konkretaj paŝoj por akceli la temon pri multlingvismo, i.a. prepare al la Universala Kongreso de 2016, kiu ja okazos en la Centreŭropa regiono. La tuta sesio estis registrita, kaj, post la necesaj tradukoj, estos publike alirebla por regantoj de la angla, kio

certigas al ĝi vastan publikon.

Jozef Reinart

LINGVOTAGA KONFERENCO EN FLORENCO

En Florenco (Italio) Eŭropa Komisiono kunlabore kun prezidanta lando Italio organizis la ĉefan oficialan eventon dediĉe al Eŭropa Lingva tago inter la 25a kaj 26a de septembro - konferencn kun la temo “Eŭropaj kaj naciaj perspektivoj pri multlingvismo”. Venis reprezentantoj el multaj naciaj ministerioj pri edukado kaj homoj el universitatoj, esploristoj pri edukado, ktp. sed proksimume duono de la ĉeestantaro estis italoj.

Estis samtempa interpretado inter 5 lingvoj – de, en, es, fr, it. Preskaŭ ĉiuj italoj fakte parolis itale, kaj estis evidente ke la organizantoj petis la germanajn prelegantojn paroli germane dum granda parto de prelegantoj de Eŭropa Komisiono parolis france.



Partoprenis 3 esperantistoj kiuj nome de EEU kaj E@I estas membroj de Platformo pri multlingveco: Maja Tišljarić, Petro Balaž kaj mi. Krome surloke evidentiĝis ke inter partoprenantoj estas du pliaj esperantistoj, do estas menciinde ke kadre de konferenco kiun partoprenis nur invititaj partoprenantoj, inter entute pli-malpli 300 personoj estis eĉ 5 esperantistoj.

Mi publike parolis dum kelkaj minutoj pri la raporto de la Platformo, specife pri la rekomendo ekscii per la praktikado kiu dua lingvo plej multe spronas la studadon de sekva lingvoj. Mi petis la reagon de la panelo, sed neniu respondis, kaj la prezidanto (anglo) “forĝesis” memori ilin pri mia demando. Sed pluraj aliaj homoj venis al mi kaj petis informojn pri, laŭ ili, “brila aliro al la lingvolernado” – mi nur unufoje menciis ke temis en Britio pri lingva orientiga kurso de Esperanto.

Mi donacis la libron de Angela Tellier pri la lernfaciliga valoro de Esperanto al 6 gravuloj, de la ministroj pri edukado de Hispanio, Slovakio, kaj edukaj esploristoj ne-esperantistoj (Angela insistas ke oni donacu la libron al ne-esperantistoj, por plimulti konon pri Esperanto inter novaj homoj).

Hazarde, en la aviadilo reen de Florenco al Bruselo, mi sidis apud mia plej alta ĉefo, la direktoro de DGT en la Komisiono, la ĉefo de 2500 tradukistoj, Rytis Martikonis, kaj sukcesis paroli kun li pri lingvo.info kaj aliaj aferoj.

Seán Ó Riain


12-a RENKONTIĜO DE ESPERANTO-VERKISTOJ KAJ TRADUKISTOJ

La 13-an de septembro okazis en Hraščina norde de kroata ĉefurbo Zagrebo la 12-a renkontiĝo de Esperanto-verkistoj kaj tradukistoj kiun organizis Kroata E-Ligo kaj Esperanto-Societo »Trixi«¹. La organiza spirito kiel ĉiam estis Spomenka Ŝtimec, la plej konata originala E-verkistino el Kroatio. La ĉi-jara renkontiĝo estis la plej granda laŭ la nombro de partoprenantoj: alvenis okdeko da homoj el Pollando, Hispanio, Slovenio, Serbio, Litovio kaj Kroatio. Ĉefgasto estis unu el la kvar bardoj de la ibera skolo: Miguel Gutiérrez Adúriz (artista nomo: Liven Dek).



Li parolis pri sia verkaro, pri la ibera skolo kaj aparte pri liaj lastaj verkoj. Estis la unua renkontiĝo kun verkisto el tiu regiono kaj ĉiuj tre ĝuis ĝin. Pri lia verkaro parolis Zlatoje Martinov kiu atente pristudis fakliterature la verkaron de Liven Dek. Krome prezentiĝis interesa projekto entreprenita de Grafokom el Đurđevac: nome

eldono de la manuskriptoj de Tibor Sekelj sub la nomo »De Patagonio al Alasko«. Necesis unue elekti la tekstojn el la manuskriptoj de Tibor Sekelj, kiuj estis verkitaj en la serba, kaj tiam esperantigi ilin, kion faris deko da tradukistoj, fine ĉion unuecigi, redakti kaj eldoni. Poste prezentiĝis la pola tradukisto Tomasz Chmielik kiu lastatempe multe okupiĝas pri albana literaturo kaj pro lia stimulo kaj helpo de albanaj esperantistoj aperis pluraj libroj de albanaj aŭtoroj en Esperanto. Krome li okupiĝas pri studo de la tuta flankingva verkaro de Edmond Privat, kio estas enorma laboro kaj ege grava kiu klarigas multegajn aspektojn de la vivo de tiu E-pioniro, kies 120-jariĝo de la naskiĝo estas en tiu ĉi jaro.



Fine Judita Rey prezentis novan porinfanan libreton el Kroatio »Heliko Slavek en la kampoj de sunfloroj« kies autorino Sonja Zubović ĉeestis kaj mem iom parolis pri la libro.

Enkonduke en la aranĝon okazis plaĉa koncerto kun partopreno de perkutistino Kaja Farszky kaj operkantisto Neven Mrzlečki. Ne estu pretervidita ankaŭ bonega regalado kiun

la organizantoj preparis kaj kies plenumantino kiel kutime estis Jadranka Farszky.

Flegi originalan E-literaturon estas grava tasko de esperantistoj sed ne multaj E-movadoj tion seriozo prizorgas. Tial dankon al KEL kaj Spomenka kiuj jam longatempe zorgas pri tio kaj pene serĉas (kaj trovas) financajn rimedojn por tio.

La ĉeeston de Miguel eluzis ankaŭ esperantistoj el Maribor (Slovenio) kiuj organizis lian gastadon en sia societejo la 17-an de septembro. Por lia gastado regis escepte granda intereso kaj partoprenis 25 esperantistoj el Norda Slovenio. Miguel ĉiujn ĉarmigis per siaj rakontoj pri la literatura agado kaj rakontante pri si mem.

Zlatko Tišljar

MANIFESTO POR LINGVOJ DE LA ĈIU-PARTIA PARLAMENTA GRUPO PRI MODERNAJ LINGVOJ

La angla estas grava monda lingvo, sed la plej lasta avangarda esploro montras, ke en la 21a jarcento paroli **nur** la anglan estas same malavantaĝa kiel **ne** paroli la anglan.

Scio de aliaj lingvoj – kaj de aliaj kulturoj – estas grava por edukado kaj lertoj, la ekonomio, internacia okupiĝo, defendo kaj sekureco kaj komunumaj rilatoj.

La nacia baloto de 2015 provizos idealan okazon por fari iujn mejloŝtonajn sindevigojn – por la daŭro mallonga, mezlonga kaj longa – por fari ŝtupan ŝanĝon en la brita nacia kapablo pri modernaj lingvoj.

Sen tiu abrupta ŝanĝo:

- suferos nia ekonomio, dum britaj firmaoj estas tenataj malantaŭaj en transmonda komercado,
- suferos niaj junuloj dum ili malavantiĝas en tutteraj labormerkatoj,
- suferos nia internacia reputacio kaj kapacito por tuttera influo,
- estos damaĝitaj niaj defendaj kaj sekurecaj interesoj eksterlande,
- estos malriĉigita nia kultura ĉefurbo enlande.

Ni bezonas daŭran agadon tra Britio por revivigi la nacian kompetentecon pri lingvoj, kaj por ĉesigi la kreskantan tendencon por lingvolernado esti nur la tereno de la elito. Ĉiuj infanoj, ne nur la 7% en privata edukado, havu altakvalitan lingvoedukon por ekipi ilin por ludi sian rolon en tuttera mondo.

LA PREMANTA ARGUMENTO POR PLIBONIGI LA BAZON DE NIAJ LINGVAJ LERTOJ

£48 miliardoj jare, kiun Britio riskas perdi en internaciaj vendoj pro lingva kaj kult ura ignorado

J Foreman-Peck, Cardiff Business School

'En pli kaj pli diversa kaj interkonektita mondo, **lingvokapaloj gajnas kaj ne perdas sian rilatecon.**'

British Academy

Postenoj restas neplenigitaj ĉar kandidatoj ne havas lingvokapablojn – kaj la plej grandaj mankoj estas inter bazaj stabanoj (22% en 2013) - UKCES

'La venonta generacio de entreprenposedantoj devas esti **'naskita tutmonda'** kun lingvokapabloj'.

Britaj Ĉambroj de Komercado

Postenoj restas neplenigitaj ĉar kandidatoj ne havas lingvokapablojn – kaj la plej grandaj mankoj estas inter bazaj stabanoj (22% en 2013) - UKCES

'La venonta generacio de entreprenposedantoj devas esti **'naskita tutmonda'** kun lingvokapabloj'.

Britaj Ĉambroj de Komercado

APPG gvidas vokon al ĉiuj politikaj partioj por subteni **Kadron por Nacia Reboniĝo de Lingvolernado** en iliaj manifestoj por la nacia baloto de 2015:

- **Longdaŭra sindevigo por transformi la reputacion de britaj civitanoj kiel malbonaj lingvistoj, malemaj estimi lingvojn aliajn ol la angla.** Lingvoj estas por nia estonteco same gravaj kiel la kernaj temoj Scienco, Tehnologio, Inĝenierado kaj Matematiko. Direktado estas bezonata por certigi, ke ili ricevas egalan agnoskon.
- **Altkvalita lingvolernado de ĉiuj infanoj tra Britio ekde la aĝo de 7.** Subteno por instruistoj kaj trejnistoj por evoluigi siajn lingvajn kaj profesiajn kapablojn kaj konduki al reboniĝo.
- **Celo por ĉiu infano ricevi altkvalitan lingvokvalifikon antaŭ la fino de duagrada eduko.** La reformo de la ekzamenoj GCSE kaj A-niveoj devas kuraĝigi kaj rekompenci progreson al pli altaj niveloj.
- **Aktiva kuraĝigo por entreprenoj kaj dungantoj okupiĝi ataki la krizon.** Subteno por lernejoj kaj dungitoj kunlabori. Impostaj avantaĝoj kaj aliaj instigiloj por entreprenoj trejni kaj varbi enlandajn lingvistojn.
- **Sindevigo konservi kaj evoluigi britan lerton pri modernaj lingvoj kaj kulturoj en universitataj lingvofakoj.** Konservu la statuson de lingvoj kiel studobjektoj 'strategie gravaj kaj endanĝeraj', kaj la daŭran subtenon por la Jaro Eksterlande.

La kadron por Nacia Reboniĝo en Lingvolernado subtenas pli ol 100 entreprenoj, organizaĵoj kaj gvidantoj, universitatoj kaj ĉiuj grandaj lingvoedukaj organizaĵoj. La plena kaj ĝisdatigata listo de subtenantoj estas trovebla ĉe <http://blog.britishcouncil.org/appg-modernlanguages/>

Esperantigis Ian Fantom

81-a ITALA ESPERANTO-KONGRESO

Amikeco transnacia sen interpretistoj

Fai de la Paganelo, belega urbeto je mil metroj super la marnivelo en provinco Trento, skiejo vintre kaj freŝa turisma loko somere (tiun ĉi jaron eĉ tro freŝa), gastigis de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto la 81-an Italan Kongreson de Esperanto, kies temo estis "Esperanto kaj novaj teknologioj".

En la tuta urbo oni vivis dum unu semajno esperantan etoson: standardoj, afiŝoj, ŝildoj esperantaj kaj la esperantistoj, kiuj portis la nomkarteton kun la logo de Esperanto, amase vizitis la publikajn ejojn. Estis eĉ komercistoj kiuj salutis vin en esperanto: Bona tagon, Bonan tagon.

LA BEZONO POR NACIA REBONIGA PROGRAMO

Nur **9%** da anglaj 15-jaraĝuloj kompetentas en sia unua fremda lingvo preter la baza nivelo, kompare kun meznombre 42% tra 14 landoj.

Lingvoj estas devigaj por ĉiuj ĝis 16-jaraĝaj por **69%** da sendependaj lernejoj, sed nur **16%** en ŝtataj lernejoj.

Lingvoj je A-level (alta nivelo de la nacia lerneja ekzameni) estas en profunda krizo. Nombroj por A-nivelo en la franca kaj germana falis je **10% en unu jaro**.

La nombro de studentoj kiu studas por universitataj lingvodiplomoj estas je rekorda malalto. **44 universitatoj nuligis lingvodiplomojn** depost 2000.

Ekzistas urĝa neceso **trejni instruistojn de elementaj lernejoj** por sukcese realigi instruadon de lingvoj en elementaj lernejoj.

La regiono Trento eldonis du broŝurojn por la okazo en esperanto, unu por la somero (Trentolando: somera deziro), la alia por la vintra periodo (Granda neĝo por granda ferio). Kaj estas eĉ komercisto kiu kreis novan, altkvalitan bieron, metian, kiu havas nomon esperantan Malsimpatiuola, la malagrabla, ĉar ĝia alnomo estas La Malsimpatiuolo.



La kongreso startis sabaton, la 23-an. Post la ricevo de la kongresanoj, preskaŭ tri cent (220 aliĝintoj kaj tiuj kiuj aliĝis surloke), venintaj praktike el la tuta mondo, inkluzive el Ameriko, Azio kaj Aŭstralio, kvankam temis pri la ĉiujara itala kongreso kaj ne pri tiu universala. Mankis nur Afriko, ĉar la afrikaj esperantistoj kiuj aliĝis ne povis akiri la vizon ĝustatempe. Sabaton posttagmeze okazis Meso en esperanto kaj poste Interkona Vespero, vespero de reciproka interkonatiĝo. Dimanĉon, la oficiala inaŭguro. Post la salutoj de la reprezentantoj de la komunumo, de la provinco kaj de la regiono, faris la inaŭguran paroladon la hungaro Stefan MacGill pri la temo: Perspektivoj por Esperanto, hodiaŭ. Poste portis siajn salutojn la reprezentantoj de diversaj fakasocioj kaj de la naciaj asocioj de Esperanto. Estis ankaŭ iu kiu venis el Ukrainio kaj la reprezentanto, alportante sian saluton, finis kun la vortoj Paco, Paco, Paco.

Semajno densega de okazintaĵoj, konferencoj, kunvenoj. Sed ankaŭ por tiuj, kiuj ne interesiĝis pri la kongresaj laboroj, ĉiutage ekskursoj - elektante inter tiuj duontagaj kaj tiuj tuttagaj – al la belegaj lokoj de Trentlando. Dum la tago, dum ĉiu tago, variaj aktivecoj sekvis unu la alian kaj surmetiĝis inter si ankaŭ, tiel ke ĉiuj povis elekti unu aŭ la alian: prezentado de libroj, prelegoj pri specifaj temoj, kursoj de esperanto por komencantoj aŭ por progresantoj, kunvenoj pri diversaj temoj, k.t.p.



Ĉiam funkcia la libroservo, kun ĉiuj specoj de libroj en esperanto aŭ pri esperanto. Kaj pluraj ekspozicioj. Aparte tiu de la materialo de la epoko, ĝis 1950 (revuoj, poŝtkartoj, afiŝoj, kuriozaĵoj), ĉiuj materialoj je konsiderinda intereso. Revuo el 1930 havis la titolon UŜE (Esperantistoj realigu UŜE - Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo), anticipante grandan aspiron de la sekvaj jardekoj, ĝis hodiaŭ. La malferma titolo de la revuo recitas, per latina esprimo, "Quo vadis Eŭropo?" (Kien vi iras, Eŭropo?).

Vespere, ĉiuvespere, estis teatraĵoj luditaj en esperanto (Terura sonĝo; Feliĉas ĉiuj?) aŭ koncertoj de kantoj, ĉiuj en esperanto, faritaj de bonaj kantistoj (JAK La Puil, JoMo, Campanil Bas). Kaj ekde la 23-a ĝis malfrue, programoj por gejunuloj kun muziko, dancoj kaj festado kun lokaj produktaĵoj.

La Kongreso fermiĝis vendredon la 29-an, kun la rendevuo en San Benedetto del Tronto (AP), por la 82-a Itala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2015.

Amerigo Iannacone

20-MINUTA TV-ELSENDO EN RUMANA TELEVIDO

La oka tridek en sabata vespero. Salonpleno rigardas projekcian ekranon. Komenciĝas la kutima kaj konata raportaĵa programo en la ĉefa televida kanalo de Rumanio TVR1. Kiel kutime, la 20-minuta programo prezentas nur unu temon: en la 27a de septembro, la temo estis Esperanto. Tiu kanalo kaj programo estas spektata en ĉiu lasta vilaĝo de la lando; tiom ampleksa diskonigo per publika komunikilo estas unika kaj unuafoja en la historio de la rumana movado. La tuto fontis el postsekvoj de la OSIEK-konferenco en Braŝovo julie, iel la produktista teamo mem elektis trakti tiun temon kaj kontaktis s-inon Rodica Todor, kiu donis pliajn kontaktojn; baldaŭ la ĵurnalisto ricevis buntan dosieron da faktoj, argumentoj, kontakt-personoj kaj svarmo da retej-adresoj. La filma kaj munta procezo daŭris du semajnojn. Aldone al vivaj intervjuoj kun deko da rumanoj – la plej konata el tiuj prof. Mihaj Trifoi, la prezidanto de EAR, okazis skajpaj intervjuoj kun s-roj Seán Ó Riain el Irlando (pri la kostoj de interpretado en internaciaj forumoj) kaj Ionel Onet el Nederlando (pri la lernfaciligaj kvalitoj de Esperanto). La raporto estis profesinivele kunmetita (laŭ fakula prijuĝo), kovris rapide multajn terenojn kaj entiris amason da konvinka materialo el la reto: ĉina TV-raportado, klas-interŝanĝoj, la Eo-parolanta infaneto kaj multo pli. Ĝia tono estis esence pozitiva, emfazante la kulturajn valorojn, kiujn la lingvo malŝlosas. La juna prezentanto, Lucian Pirvoiu dum la intervjuoj ekaŭdis la lingvon kaj konstatis ĝian funkciadon, kun iom da preparhelpo de Rodica Todor, prezidantino de IFEF, fermis la prezentaĵon per du-tri frazoj en tute konvinka Esperanto. La raporto estis registrita, kaj estas rigardebla ĉe: http://stiri.tvr.ro/vorbiti-esperanto--intre-ciudatenie-lingvistica-si-sistem-international-de-comunicare_50604.html

Tiu salonpleno da spektantoj rigardintaj la raportaĵon estas kunvenintoj en Rascruci, apud Cluj-Napoca por la ĉiujara seminario de la rumana Landa Asocio. Tuj post la elsendo koruso da poŝtelefonoj sonis, ĉirpis kaj blekis – alportantaj gratulojn al ĉiu koncernito. La seminario traktis multajn temojn; nelaste, kion oni faru por pli efike posttrakti la interesigaĵon de intervjuo kiel tiu ĵus vidita

Stefan MacGill

"ESPERO?"- ESPERANTA FILMO PREMIITA EN ZARAGOZO

En Zaragozo okazis film-festivalo nomata "Ecozine" kun bona surprizo. Unu el la premioj estis por mallonga filmo (4 min. 21 sek.) originale en Esperanto. La titolo estas "Espero? (Hope)". La filmon eblas spekti en interreto: <http://vimeo.com/71742636>

Jen informado pri la reĝisoro Simone Giampaolo kaj ties filmo(j):
<http://simonegiampaolo.com/> <http://simonegiampaolo.com/page/2/>
Kaj jen pri la filmo: <https://www.facebook.com/esperohope>

La traduko al Esperanto estis farita de Mariana Evlogieva.

NOVA KULTURSEZONO EN OOSTENDE

Sabaton la 27-an kaj dimanĉon la 28-an de septembro, de la 10:00-a ĝis la 18:00-a, La E-societo La Konko partoprenis en tiu ĉi evento kun budo en la ĝiĉeto-salono de la Kultura Centro de Oostende. Estas la antaŭa PTT-domo, kiu estas renovigita kaj adaptita al moderna teatro kun ĉiuj novaj ekipaĵoj. (Hendrik Serruyslaan 18 A). En la salono Dactylo oni daŭre prezentis plurajn fimetojn, inter ili la unua provo de la DVD Europa Himno kun parto de ĉiuj ŝtataj himnoj de EU.

Flory Witdoeckt

OKAZE DE EŬROPA LINGVO TAGO EEU LANĈIS LA PORTALON LINGVO.INFO

La granda projekto kunordigata de EEŬ lingvo.info estas en fina fazo de ellaboro kaj okaze de Eŭropa lingva tago la teamo oficiale lanĉis la portalon (kvankam ne ankoraŭ finpreta). Tiukaze okazis pluraj aranĝoj dediĉitaj al tiu lanĉo kaj aperis pluraj informoj pri ĝi en diversaj nacilingvaj medioj.



En Maribor Asocio por Eŭropa Konscio, unu el la partneroj de la projekto, organizis publikan prezenton de lingvo.info kune kun Esperanto Societo en loka kulturcentro.

Pri la portalo kaj projekto parolis Zlatko Tišljär kaj demonstris la eblojn kiujn la portalo ofertas en la reto la 30-an de septembro. www.lingvo.info

Zlatko Tišljär

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de septembro 2014

Redaktoro: Zlatko Tišljär

En la numero kunlaboris: Jozef Reinvart, Seán Ó Riain, Flory Witdoeckt, Ian Fantom, Stefan Mac Gill, Amerigo Iannacone, Zlatko Tišljär

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

